

El Protokolo de la skajpa estrarkunsido de ILEI, 2020.02.29

Citaĵoj rilataj al la Laborgrupo pri universitata agado

Tagordo

...

3. Preparoj por la 53-a Kongreso en Kebekurbo:

3.2. simpozio en Kebekurbo.

...

5. Membrolisto : kiu havu la rajton ricevi ĝin ?

7. Universitata kaj scienca agado de ILEI:

7.1. Universitataj kursoj de Esperanto kaj interlingvistiko

7.2. Scienca kajero de IPR: ĉu, kiel, kiu faru?

7.3. Simpozio en Kebekurbo 2020

...

Iro de la kunsido

...

3.2.Simpozio: estas planata por unu tago – vendredo. Estas interesaj proponoj el la Universitato Laval. La temo estas “Evoluado de lingvoj”. Partoprenos la Kongreson Kristin Tytgat, ni povus peti de ŝi prelegon pri tiu temo. Mirejo preparas prelegon pri la evoluo de nia lingvo, Ivan kontribuos per konkretaj ekzemploj kaj informos ŝin.

...

Punkto 5. Membrolisto : kiu havu la rajton ricevi ĝin ?

Mirejo informis, ke anoj de la Laborgrupo pri la universitata agado petis datumojn – nome – retadresojn de la ILEI-anoj. Tio estas tikla afero pro la postuloj pri privateco. Membroj de ILEI ne donis konsenton pri transdono de siaj personaj datumoj ekster la Ligo. Post diskuto estis decidite, ke anoj de la Laborgrupo diskonigos diversajn informojn tra du estraranoj: Ivan Colling kaj Radojica Petrović, kiuj ambaŭ membras en la Laborgrupo. Ivan kaj Mirejo provos trovi ĉiujn retadresojn de niaj membroj.

...

Punkto 7. Universitata kaj scienca agado de ILEI. Raportis Ivan Colling.

7.1. Universitataj kursoj de Esperanto kaj interlingvistiko

Estas malfacila ka esplenda afero. Unuigi fortojn en tiu direkto estas grava tasko por ILEI.

7.2. Scienca kajero de IPR: ĉu, kiel, kiu faru?

Ivan rakontis pri la nova propono de Vicente Manzano Arrondo, ano de la Komisiono pri Universitata Agado. Temas pri iu loko, kien oni planas meti resumojn de sciencaj artikoloj. Post diskuto aperas, ke ni ne povas imagi en IPR resumon pri mekaniko aŭ pri medicino. Tamen artikolo, resumo, pri instruado en tiuj fakoj jes povus aperi.

Mirejo proponis, ke tiuj resumoj de sciencaj esploroj povus aperi sur la paĝaro de ILEI – apud la parto “Pedagogiaj dokumentoj”:

<https://www.ilei.info/dok/index.php?lingvo=eo>

Ni povus krei rubrikon “sciencaj resumoj” pri iuj fakoj. Konsentite. Mirejo kontaktos kun Jozefo.

...

Decidoj:

1. ...

2. La Komisiono pri la Universitata Agado diskonigu diversajn informojn tra du estraranoj: Ivan Colling kaj Radojica Petrović, kiuj ambaŭ membras en la Laborgrupo.

3. ...

<fino de la citaĵoj>